

# ESPERANTO\*INFO

## \*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

**K**ontraŭ maljusto oni povas kaj devas agi diversmaniere, laŭ malsimilaj vidpunktoj kaj prioritatoj. Ni, esperantistoj, decidis agi kontraŭ la nuntempa unudirekta tutmondigo aparte kontraŭ unu el ĝiaj plej gravaj flankaj damaĝoj, t.e. la nuligo de lingva kaj kultura diverseco.

2011 estis aparte bona jaro por la kataluna Esperanto-movado. La kvanto de novaj membroj estas rekorda, kaj rekorda estas la nombro de novaj lernantoj en la barcelonaj kursoj. Laŭ mi influas la forta engaĝiĝo de la novaj estraranoj, ilia profesieca laboro, kaj la alta kvalito de la novaj aktivuloj.

Ferriol Macip

## ESPERANTO\* CAT

\*Asociació Catalana d'Esperanto  
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe „Generalitat de Catalunya“, en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2011:  
individua abonanta membro, 64 eŭroj;  
pensuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta  
membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers,  
Agència 001, Barcelona  
Kontonumero: 3025 0001 15 1433398158  
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158  
UEA-konto: kaea-b  
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:  
Prezidanto: Carles Vela;  
vicprezidanto: Josep Franquesa;  
sekretario: Ramon Perera;  
vic-sekretario: Víctor Solé; kasisto: Sebastià  
Ribes; voĉdonantoj: Angels del Pozo,  
Llibert Puig kaj Montserrat Franquesa.

Apartat/Poŝtkesto 1008  
08200 Sabadell (Vallès Occidental),  
Països Catalans/Kataluna Landaro  
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633  
Ret-adreso: info@esperanto.cat  
Ret-paĝo: www.esperanto.cat

## EN LA ASOCIA FOIRO DE LA KATALUNA LANDARO

Kataluna Esperanto-Asocio starigis budon la pasintan 11an de septembro en la Asocia Foiro de la Kataluna Landaro okaze de la nacia tago. La foiro celas grupigi ĉiujn asociojn de la lando kaj en ĝi okazas prelegoj, koncertoj kaj ĉiuspecaj aranĝoj. La kvanto de asocioj starigintaj budojn kaj la nombro de vizitantoj kreskis rilate al pasintaj jaroj. Niaj rezultoj post unu mateno tie estis pli altaj ol tiuj pasintjaraj post la tuta tago.

La ĉefa intereso de la vizitintoj estis la principaro de la Asocio kaj la plej petita informo estis pri ĉeestaj kursoj de Esperanto. Krome, oni petis nian helpon por filmeto en Esperanto. Ni okupiĝos pri traduko de la dialogo kaj pri helpo al aktoroj bone prononci.

La plej petitaj libroj estis *La Eta Princo*, esperanta traduko de *Le Petit Prince* de Saint-Exupéry, kaj la libro *Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*. Jordi Solé i Camardons kaj Karles Berga dis-

vendis siajn eldonaĵojn en nia budo, kiujn ŝajne tre ŝatis la publiko.

La nova formato de *Kataluna Esperantisto* estis tre bone akceptita de la publiko interesiginta pri lingvaj rajtoj. La fakto publikigi artikolojn de Sapir kaj pri Sapir vekigis laŭdojn pri la seriozeco de la revuo.

Inter la anekdotoj kutime okazantaj en niaj budoj, elstaras la vizito de du eksterlandaj knaboj, unu el Usono kaj alia el Parizo, kiuj scipovis la internacian lingvon. Sed la plezuro pligrandigis kiam ni ricevis la viziton de kelkaj samasocianoj, ĉefe Josep-Enric Peres i Blesa el Valencio kaj Vagn Frausing el Danio, kaj de Jesús Armengol, kiu venis el Usono ankaŭ por partopreni la nacian tagon.

fm

## EN LA SOMERA UNIVERSITATO DE PRADA DE CONFLENT

La Kataluna Somera Universitato (KSU) proponis ĉi-jare kelkajn kursojn pri planlingvoj, ĉefe pri esperanto kaj tokipona.





*Ekspozicio en Popolkultura ateno de L'Hospitalet de Llobregat*

En tiuj kursoj, gviditaj de Nicolau Dols i Salas, Xavier Margais, Elisabet Abeyà kaj Lluís Batlle, partoprenis multnombraj interesplenaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj.

Fine de la kursoj, la partoprenantoj de la KSU kaj tiuj de la Esperanto-grupo Conflent renkontiĝis en kafejo en la centro de Prada de Conflent por interŝanĝi, kaj esperante kaj katalune, spertojn kaj estontajn projektojn.

La ĵurnalo *L'Indépendant* raportis la eventon en sia eldono de la 1a de septembro.

fm

## UNUA RETĴURNALO EN LA ARAGONA

La pasintan 19an de septembro naskiĝis *Arredol*, la unua retĵurnalo redaktita plene en la aragona lingvo. Ĝi aperas kun forta emo plifortigi la aragonan en medio celanta esti gvido-punkto, kun nuntempaj informoj el la tuta mondo, kaj precipe el Aragono.

Ĝi plifortigos la reton 2.0 kaj ĝi estis ja tre aktiva la lastajn monatojn en Facebook kaj en Twitter.

Arredol estas profesia projekto kiu donas al la aragona lingvo la dignon kiun ĉiu lingvo meritas.

fm

## INCENDIO OKAZIGAS GRAVAJN DAMAĜOJN EN VINILKOSMO

Vinilkosmo, esperanta disk-eldonejo de de la asocio EUROKKA, kun sidejo en Dònevila (Lauragués, Okcitanio) suferis gravan incendion en la nokto de la 18a al la 19a de septembro. La fajrego detruis la tutan sonmaterialon de unu ekzercejo kaj la diskojn tie stokitajn. Feliĉe la incendio ne atingis la studio-registrejon kaj Vinilkosmo povos daŭrigi la registraĵojn. Sed la perdita materialo por la studio mankos kaj necesos reaĉeti ĝin.

Pro la grandeco de la damaĝo kaj la diversa posendateco de la perdita materialo devas veni kvin ekspertoj de kvin malsamaj sekurkompanioj. Tial, la afero daŭros longe ĝis Vinilkosmo scios kion kaj kiam la asekurkompanio pagos.

La diskoservo daŭre funkcias kaj eblas mendi diskojn kiuj ne estis detruitaj. Bonŝance la lastaj eldonaĵoj estis stokitaj aliloke. Ni povas helpi Vinilkosmon per aĉeto de diskoj per la retejo kaj per elŭto de albumoj aŭ bonprezaj kantoj en mp3 per la reta elŭtservo.

Daŭre estas lanĉataj novaj projektoj. Ĉijare aperos du pliaj albumoj kiuj aldoniĝas al sep aperintaj titoloj ekde la komenco de la somero.

fm

## EKSPOZICIO EN POPOLKULTURA ATENEO

La nova sidejo de la Ateneo pri Popola Kulturo de L'Hospitalet de Llobregat gastigis ekspozicion pri Esperanto inter la 5a kaj la 16a de septembro. Ĝi estis amase vizitata.

La ekspozicio montris esperantajn afiŝojn de internaciaj kaj naciaj kongresoj, desegnojn pri instruado de Esperanto, kaj ok panelojn enhavantajn esperantajn bildkartojn el diversaj landoj, kovertojn de korespondado, kristnaskajn gratulkartojn, kartojn pri la Muzeo de Esperanto de Subirats, fotojn de Esperanto-stratoj, bildojn ktp.

Estis ankaŭ tri tabloj sur kiuj kuŝis ĉiuspecaj libroj, revuoj kaj turisma propagando en Esperanto pri diversaj urboj.

La 16an de septembro je la 19a horo oni fermis la ekspozicion per eta parolado kaj bongustaj manĝetoj.

Martí Guerrero

## PREZENTO DE LA MUZEO EN LLEIDA

Sabaton la 22an de oktobro oni prezentis la Muzeon de Esperanto de Subirats kaj ĝian aktivajn en Lleida. La aranĝo okazis en la vendejo kaj kulturejo La Brokante-ria, strato Caldereries 9, en la historia urbocentro.

Dum la 25a datreveno de la 22a Kataluna Kongreso de Esperanto en urbo Lleida, oni inaŭguris La Brokante-ria-n. Temas



*Sabaton la 22an de oktobro oni prezentis la Muzeon de Esperanto de Subirats kaj ĝian aktivajn en Lleida*

pri vendejo kaj kulturcentro interesiĝanta i.a. pri Esperanto kaj ĝia disvastigado, kiu ebligis prezenti en la urbo la Muzeon de Esperanto de Subirats (MES).

Vespere de la sama tago, areto da esperantistoj kaj simpatiantoj ĉeestis en La Brokanteria por kundividi spertojn, paroli pri la Muzeo kaj prikomenti la proponojn de la ĉi-jara Kataluna Kongreso de Esperanto okazanta kelkajn tagojn poste en Barcelono. La vespero, en la malnova urbocentro de Lleida, vekis la intereson de la ĵurnalo *Segre*, ĉefa loka ĵurnalo kiu raportis. Oni konstatis, ke malgraŭ havi komunan ligilon per Kataluna Esperanto-Asocio, la Esperanto-movado en Lleida estas ĉi tiu kaj al ĝi mankas loka strukturo permesanta pli multajn aliĝojn, disvastigon de la movado kaj organizon de aranĝo. Tial, sidejo kiel La Brokanteria povus iĝi mejloŝtono en tuj estonteco.

MES

## ENRETIGITA LA KATALOGO DE LA MUZEO


Danke al la laboro de Javier Guerrero, de antaŭ kelkaj semajnoj eblas konsulti la bibliografian kolekton de la Muzeo de Esperanto de Subirats. La retkatalogo enhavas preskaŭ 12 000 bibliografiajn informojn pri la libroj disponeblaj en la biblioteko kaj ĝi estas konsultebla ĉe [mesperanto.alwaysdata.net/opac/index.php](http://mesperanto.alwaysdata.net/opac/index.php).

## KONVERSACIAJ RONDOJ. SAMLOKE ANTAŬ 103 JAROJ

Ĉiumarde kelkaj esperantistoj renkontiĝas en trinkejo La Terreta, ne for de mia domo, por iomete babili esperante en agrabla etoso. La trinkejo estas vidalvide de la Centre Artesà Tradicionàrius. Foje ni kunvenas ankaŭ en tiu malnova kaj bela konstruaĵo. En tiu ĉi sama loko, oni stariĝis antaŭ 103 jaroj esperanta grupo «La Metiisto» (esperantigo de l'Artesà).

Jen la novaĵo en revuo Esperanto, 46-47 (1-15 januaro 1909), paĝo 5.

Javier Guerrero



Barcelona. — En la Societo « El Artesano » (strato Travesía S. Antonio, 18, Gracia), estis fondata la 22<sup>a</sup> de Decembro de la nuna jaro, esp. grupo nomita « La Metiisto ». La direkta komitato konsistas el S-roj: Josefo Soñona, prez.; Mikaelo Artigues, kas.; Henriko Cardenal, sek.; Josefo Maseip, kaj F-ino: Tereso Amat, voĉoj.

## 35A KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO

**S**pite al la financa monda krizo kaj al la ne tute favora veterprognozo la 35a Kataluna Kongreso de Esperanto sukcese okazis en la kataluna ĉefurbo, Barcelono, de la 28a ĝis la 31a de oktobro, plus unutaga postkongreso en la apuda urbeto Subirats, ĉe la Esperanto-Muzeo. La Kongresejo estis la kulturcentro La Farinera en la kvartalo Clot, tamen oni ankaŭ okazigis aranĝojn en la kafejo Horiginal, en la tombejo de Montjuïc, en la muzika centro Tradicionàrius kaj eĉ surstrate tra la urbo.

Kvankam temis pri nacia kongreso la ĉeestantaro estis sufiĉe multnacia: preskaŭ 140 aliĝintoj alvenintaj el la kongreslando, Okcitanio, Francio, Italio, Svislando, Flandrio, Slovenio, Nederlando, Svedio, Kimrio, Brazilo kaj eĉ Tajvano!

Ofte oni prave diras ke unu el la problemoj en la Esperanto-movado estas la aliro al la ne-esperanta mondo, parte pro certa fermiteco de la movado mem, kaj parte pro la indiferenteco aŭ la negativa sinteno de la nacilingvaj amaskomunikiloj. Kataluna Esperanto-Asocio plene konscias pri tio kaj tial starigis en siaj agadprincipoj konstantan engaĝiĝon en la kataluna socio, kion nia nacia kongreso klare respiegulis: Antaŭ la kongreso sendado de perreta informado al la enlanda ĵurnalaro, okazigo de katalunglingva antaŭprezento de la kongreso en la sidejo de Omnium Cultural (gravega kultura asocio dediĉita al la defendo de la katalunaj lingvo kaj kulturo). Dum la kongreso okazis prelegoj katalunlingve pri Esperanto, la koncertoj estis malfermaj al neesperantistoj... Dank' al tiu laboro ni sukcesis reeĥon en diversaj komuniloj: tutpaĝa artikolo en la alternativa semajngazeto *La Directa*, mezbona elsendo ĉe la loka televidstacio Barcelona TV, mencio en la plej aŭskultata radistacio RAC1, kaj aparte favora dupaĝa artikolo en la dimanĉa eldono de la ĵurnalo *Ara*.

Malfacilas la tasko raportiri pri ĉiuj diversaj eroj de la kongreso kiu estis enhave varia kaj okazis diversloke tra la urbo, kaj eĉ ekster ĝi, inkluzive de la postkongreso.

Jen rapida laŭtaga resumo de la aranĝoj:

Vendrede la afero komenciĝis posttagmeze, dum kelkaj amuziĝis lernante po-



poldancojn kun Mon Cardona, aliaj povis sekvi la katalunlingvan prelegon de Ramon Rius: «kial Esperanto estas tiom alloga». Jam en la nokto kongresanoj kaj eksteruloj povis spekti la koncerton de Vera Girard kaj JoMo. Post la ĉarmo kaj velura voĉo de Vera sursceniĝis la muzika torento, JoMo, kiu senlace muzikis kaj kantis okcitane, esperante, katalune kaj eĉ en la lingala lingvo!

La sabato estis la plej densa kongrestago: kun ioma mediterranea prokrasto okazis la inaŭguro kun partopreno de la familianoj de nia pioniro Jaume Grau Casas kaj de magistratano de la urbeto Subirats kiu invitis nin postkongresi tie.

Tuj ekis la prelegoj, kaj la embarasa elekto ĉu aŭskulti la prelegon de Zlatko Tišljar pri lingva politiko en Eŭropa Unio, rekte ligita al la kongresa temo, aŭ ĉu artismumi. Tiukaze denove oni devis decidi ĉu aniĝi al la korusa ateliĝo de Carles Vela aŭ al la poezia komisiono de la genia vortĵonglisto Jorge Camacho.

Tuj poste Katalin Kováts prelegis pri iu tre persona, la lingva edukado de sia filo en multlingva medio kaj la malfacilaĵoj kiujn ŝi nekredible spertis en la nur ŝajne internacieca nuntempa Nederlando. Samtempe Kevin de Laet rakontis pri la lingva politiko en Belgujo.

En la lasta triono de la matena programo eblis elekti inter prelego pri poezio de Jorge Camacho, la talismanoj de Abel Montagut aŭ katalunglingva prelego de Jordi Solé i Camardons pri la elstara verkaro de Delfi Dalmau.

Dum ĉio ĉi okazis manpleno da infanoj homlup-ludis vartataj fare de Gemma Armadans kaj Montserrat Franquesa en apuda salono; en la akceptejo eblis aĉeti



Zlatko Tišljarić faris la konkludan prelegon de la 35a Kataluna Kongreso de Esperanto

librojn en la libroservo kaj KD-ojn el la bunta stoko de Vinilkosmo kiu starigis ankaŭ sian budon.

Ĉe la tagmanĝo la vegetaranoj povis ĝui la menuon de la kongreseja kafejo dum la aliaj devis serĉi manĝejon en la ĉirkaŭaĵo.

Post la paŭzo la aktivuloj de KEA laborkunvenis, tiuj de KEJ asembleis, dum la aliaj kongresanoj disigis por ĉeesti la diversajn prelegojn. Eblis elekti inter prelego de Abel Montagut pri Jules Verne aŭ la prezento de la strategio de Eŭropa Esperanto-Unio fare de Zlatko Tišljarić.

Tuj poste nia verva Boris Mandirola prezentis TEJO-n al junularo dum Rubeno Fernández elstare prelegis pri lingvistiko el ege filozofia vidpunkto. Kiel kolofono Katalin Kováts rakontis pri la aktualega Esperanto-instruado pere de la reto kaj samtempe ronda tablo okupiĝis pri lingva diverseco en Eŭropa Unio.

Nokte kongresanoj kaj eksteruloj povis ĝui la koncerton de Kaj Tiel Plu. La tuta ĉeestantaro spektis ĉarman repertuaron de melodioj diversepokaj kaj diverslingvaj, kaj la plej kuraĝaj eĉ povis ilin danci.

Dimanĉe la kongreso malkongresejis, buso portis kvindekda kongresanojn al la tombejo de Montjuïc. Tie troviĝas en la malnova ŝtonejo Fossar de la Pedrera uzita de la diktaturo kiel amastombo kie kuŝas la restaĵoj de pluraj miloj da viktimoj de faŝismo dum nia civila milito kaj la sekva frankisma diktaturo. Tie ni omaĝis la internaciajn brigadanojn inter kiuj troviĝis ankaŭ esperantistoj. Dani Cortijo rakontis pri la historiaj faktoj de la briga-

danoj, tujsekve Gregor Benton, filo de de brita brigadano rakontis per precizaj kaj sinceraj vortoj pri sia patro kaj lia vivo. La rememoro al tiuj homoj, duoble heroaj, kiuj riskis la propran vivon en fora lando pro idealo de alstrebo al pli bona mondo emociigis nin ĉiujn kaj larmoj fluis el multaj okuloj. Lokigo de florbukedo kaj ludado de la peco “Kanto de la birdoj” far la violono de Ferriol Macip kolofonis la plej kortuŝaneron de nia kongreso.

Posttagmeze oni denove renkontiĝis en la urbocentro. En rapida promeno nia historiisto Dani Cortijo gvidis nin tra la malnova Barcelono, li malkovris al ni nekonatajn faktojn kaj senvualigis misterojn kaj mensogojn de la historio de la kongresa urbo.

La kuna piedirado portis nin ĝis la kafejo Horiginal, tie ni sidigis en aparta salono kie triope starantaj korusanoj mute ĉirkaŭis nin. Subita mangesto de Carles Vela, kaj la voĉoj envolvis la tutan salonon kaj majstre karesis niajn orelojn. Bonega komenco por ĉarma korusa koncerto dum kiu alterne kantis TutPEKo, Cor Acord kaj la kongresanoj kiuj sekvis la kongresan atelieron.

Post la vespermanĝo la iberbardo Jorge Camacho gvidis la poezian vesperon dum kiu oni povis frandi diversajn mallongajn poemojn laŭ elekto de la ĉeestantoj mem. Eblis konstati ke la laboro de la poezia komisiono estis sukcesa kaj fruktodona ĉar kelkaj el la poemoj laŭlegitaj estis verkitaĵoj de la komisionanoj mem.

Se temas pri poezio oni pensas pri skribitaj poemoj sed ankaŭ ekzistas la buŝa poezio kaj en la vespero oni ĉeestis la ami-

kan duelon inter Xabier Rico el Eŭskio kaj Ferriol Macip el Katalunio, kiuj disputis en poeziimprovizado. Komencis ili du sed iom post iom aliaj ĉeestantoj kuraĝis partopreni la vortan pacan batalon!

Lunde ni atingis la finon de la kongreso. Jorge Camacho fingvidis la poezian komisionon, Michael Boris Mandirola prezentis la laste fonditan Nitobe-asociacion kaj ties celojn pri lingvaj rajtoj. Zlatko Tišljarić faris la konkludan prelegon kaj lanĉis defion por la katalunaj esperantistoj, kadre de la centjariĝo de la naskiĝo de Tibor Sekelj: traduki katalunen lian plej popularan verkon, *Kumeŭaŭa, filo de ĝangalo*.

La kongreson oni fermis per komuna adiaŭa tagmanĝo en la kafejo Horiginal. Post paperaviadila batalo inter la tagmanĝintoj ni forlasis la restoracion, tamen la grupo ankoraŭ ne disigis definitive. La LKK kreis novan koncepton en la Esperanto-kongreso: “antaŭpostkongreson”. Post denova enurba vojaĝeto ĝis la kultura centro Tradicionàrius, tie okazis kaŝtanfesto, tipe kataluna aŭtuna tradicio dum kiu oni manĝas kaŝtanojn, etajn kukojn nomatajn “panellets” kaj trinkas dolĉajn vinojn kaj likvorojn. Ĉar improvizado spicis plurfoje nian kongreson ankaŭ dum la kaŝtanfesto oni improvizis versetojn kaj kantojn, oni dancis laŭ la akordiono de Mon Cardona, kaj tiel ni feliĉe fermis la kongreson.

Marde, dank’ al la kunlaboro de la asocio “Amikoj de la Muzeo” kaj de la urbestro de Subirats (la nura publika institucio kiu helpis la kongreson) okazis la postkongreso en la vilaĝeto Sant Pau d’Ordal (municipo de Subirats) kie situas la Esperanto-Muzeo fondita de S-ro Lluís Hernández Izal. Je la alveno la proksimume 40 postkongresanoj estis akceptitaj de la urbestro kaj du aliaj magistratoj en la urbodomo. Post la nepraj prelegoj kaj salutoj oni regalis nin per kuko kaj donaceto, kaj kune kun la aŭtoritatoj oni akompanis nin en lokan kelon kie oni instruis nin pri la vitokulturo kaj vinproduktado; ne hazarde ni troviĝis en la regiono Penedès, famkonata pro la vin- kaj ŝaŭmvin-produktado. En la muzeo ni estis akceptitaj de la familio Hernández kaj la nuna zorgantino de la muzeo, Montserrat Piñeiro. Tie oni sciigis nin pri la projektoj rilatantaj la muzeon kaj ni povis ĵeti okulon al la miloj da libroj, revuoj, fotoj, afiŝoj, kaj diversaj objektoj de la kolekto. Post la interesa vizito okazis komuna tagmanĝo kiu definitive fermis la kongresan aktivadon.

Alfons Tur